

THE NORTH AMERICAN

Esperanto Review

**MONDA FOIRO
EN SEATLO**



MAJO — JUNIO 1962

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 10, No. 3

808 Stewart St., Meadville, Pa.

DONALD BROADRIBB, Editor

Published by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ, and founded in 1953. The Esperanto League is a participating organization in the People-to-People Program (John F. Kennedy, Honorary Chairman; Dwight D. Eisenhower, Chairman, Board of Trustees)

Subscription Rates: \$2.00, regular; \$1.75 gift subscription (three for \$4.00). **Membership Rates:** \$5.00, regular; \$10.00, supporting member; \$20.00, patron member; \$100.00, life member; \$7.00, man and wife. Checks and money orders should be payable to the Esperanto League for North America, Inc. Send all payments, subscription and membership orders to the treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington.

Officers of the Esperanto League for North America, Inc.: President, David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President, Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington.
Executive Board: Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland; Mary Gibson, P.O. Box 409, Riversdale, Fresno County, California; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; Dr. James Lieberman, 24 Clafin Rd., Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California; H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington; Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Material for inclusion in the next issue of the **Review** should be sent by the 1st of June. For inclusion in the following issue, material should be sent by the 1st of August.

OUR COVER:

Symbolizing Seattle's "Century-21" World's Fair is the 600-foot Space Needle. For story of special arrangements of interest to Esperantists, see page 53.

ESPERANTO — ITS PAST AND ITS FUTURE

1887 saw only one Esperantist in the World. Dr. L. L. Zamenhof, who after prolonged effort succeeded in finding a publisher for the first Esperanto booklet (in Russian). Today, seventy-five years later, over 8,000 volumes have been published in Esperanto, and Esperanto textbooks are on sale in all cities.

1889 was the year that the first magazine in or about Esperanto was published, *La Esperantisto*, edited by Zamenhof. This tabloid-sized paper was published until 1895. Today, about 80 printed Esperanto periodicals are published, some in luxurious format with colored illustrations.

1892 had not yet seen the existence of a single Esperanto society. Today, Esperanto associations are found in 37 countries, and some 3,000 local consuls of the Universal Esperanto Association are located in 63 nations. International organizations using Esperanto include the Legal, Railway, Geographical, Teaching, Architectural, Literary, Scout, Chess, Journalist, World Federalist, Buddhist, Catholic, Protestant, Quaker, and Medical fields, as well as organizations for the Blind, for Students, for Schools, etc.

1905 was the year of the first international convention of Esperantists, in Boulogne-sur-mer, France. 688 participants gathered for a week of activities using Esperanto. This year, the 47th Universal Esperanto Congress is being held in Copenhagen, Denmark, with from 2,000 to 3,000 expected.

1912 saw the dedication of the first "Zamenhof Street," honoring the International Language and its inventor. This year, at least 150 cities have named Streets, Plazas, Parks, and Avenues "Esperanto" or "Zamenhof".

1922 was the first year that an Esperanto radio program was presented. Currently, radio broadcasts in Esperanto are broadcast daily on Shortwave from both Europe and

the Americas.

1924 saw the recommendation of Esperanto by 42 members of the French Academy of Science (among them, three Nobel prize winners). This year, the Universal Esperanto Association has itself been nominated for a Nobel Prize.

1924 also saw the declaration of Esperanto as a "clear language" permitted for use in international telegrams and radio.

1925 was the year in which the first postage stamp using Esperanto text was published. This year, the twenty-fifth such stamp has been put into use.

1927 saw the founding of the International Esperanto Museum in Vienna, which today occupies two showrooms and an office in the Hofburg and is financed by the Ministry of Education of Austria.

1942 was the year that the *Universala Ligo* was founded, in Holland, which introduced the use of an international currency. Now, both coins and notes, backed by the treasury of Holland, are in international circulation under the auspices of the U.L.

1950 saw the presentation of a petition to the United Nations, urging general adoption of Esperanto. The petition contained a million individual signatures, and the support of 500 organizations with 15,000,000 membership.

1951 was the year of the founding of the international cultural center at Gresillon Castle, France.

1954 saw the recognition by U.N.E.S.C.O. of the Universal Esperanto Association, and the establishment of a consultative relationship.

1956 was the year of the first Children's Convention, held in the course of the Universal Esperanto Congress.

1961 saw Esperanto made an elective subject throughout the schools of Denmark. At present, over 540 schools in 27 countries include Esperanto classes.

1962 is the 75th anniversary of Esperanto. Events of this year are recorded in the pages of the Esperanto Review.

We cannot fill in the dates for the following, but we present them as a projection into the future:

19— will see the adoption of an international convention for the coordinated introduction of Esperanto courses in the school systems of the world.

19— will be the year when the first international daily newspaper will be published in Esperanto.

19— will see the United Nations and other international organizations holding their meetings entirely in the International Language, Esperanto.

—Adapted from an article by Pierre Boulogne in the German Esperanto Review.

★ ★ ★

Mia Animo

Mia animo preĝas,
mia animo ploras kaj krias kun vento
kun vento novembro
tra la tombejojn,
mia animo en ploro tremetas ...

Mia animo deziras,
mia animo volas sonĝi pri vi,
miaj lipoj petegas kison de vi,
sed ilin kisadas
nur vento malvarma ...

Mia animo estas sola,
estas sola
kiel vi ...

Damjan Vahen-Svetinov

WORLD'S FAIR

ESPERANTO WORKSHOP

An Esperanto workshop for those who come to the Pacific Northwest to visit the World's Fair this summer is being sponsored by the Esperanto Society of Portland, Oregon, better known as ESPO. In announcing the three-day meeting to be held in Portland on July 20, 21 and 22, Jim Deer, ESPO program chairman, said, "The program is designed to serve two purposes. First, it will serve as a convenient stopping place for Esperantists on their way to the fair in Seattle, and second, it will give our new and enthusiastic Esperantists here in the Portland area a chance to meet more experienced Esperantists from other places."

According to Deer, Portland buses are planning to run daily excursion trips to the World's Fair this summer, and visitors will find hotel reservations more plentiful and prices somewhat lower than in Seattle.

Features on the three-day workshop will include a demonstration of the Cseh direct method of Esperanto, talks on the educational and cultural facets of Esperanto, as well as technical sessions on Esperanto usage.

On Saturday morning, 21 July, no workshop activities will be scheduled, thus providing a period during which participants may conduct organizational business in regard to other Esperanto organizations of which they may be members. A meeting will be scheduled for this period, during which ELNA participants may meet together and discuss organizational affairs, and become acquainted.

More information may be obtained by writing:

Jim Deer, Program Chairman,
ESPO
12946 N.E. Hancock Street
Portland 30, Oregon
AL pine 4-8134.

★ ★ ★
★ ★ ★

The first United States World's Fair in more than 20 years opened at high noon on April 21, 1962, at formal ceremonies presided over by President John F. Kennedy.

It is the Seattle World's Fair, a preview of tomorrow, of man's life in the space age.

On a glittering fairground linked to the heart of the city by the famed Monorail, and crowned by the 60-story Space Needle, millions of visitors from all over the world are thronging the gates seeking a multitude of thrills.

Among these millions many Esperantists are expected to come to the "Fair" city, which last summer hosted the ninth annual Congress of our Esperanto League. Seattle's Esperantists (the local society has been in existence since 1905 and the city has been active in the U.S. movement without interruption since) will now play host to devotees of the green star from all corners of the globe.

Nearby Portland, Oregon, which boasts one of the newest Esperanto groups in North America, has also arranged for a special three-day workshop gathering of Esperantists, with charter buses to take participants to the Fair. (Details in separate article.)

Seattle, gateway to the Orient, first gained fame as the jumping-off point for Alaska in sourdough days. It has grown from a raw, frontier town to a modern cosmopolitan city in a mere half century.

In that new cosmopolitan spirit, the Fair is presenting spectaculars and artists signed from many foreign lands. Performers from Great Britain, the Soviet Union, France, Japan, Denmark, Greece, India, Roumania, the Philippines, Mexico, Thailand and Canada have been booked for the two new theatres, an arena and a huge stadium.

Here are some of the feature attractions of this 80-million-dollar Fair:

Monorail: A gleaming, streamlined train riding on an overhead concrete rail, transporting 10,000 passengers an hour to the Fair site from the city center. The just-over-a-mile trip along tree-lined streets overlooking the city, Puget Sound, and the Fair grounds takes just 95 seconds.

Space Needle: Tallest building west of the Mississippi, the 600-foot Needle is topped by a revolving restaurant and observation deck, affording a view of Mt. Rainier, the Olympic and Cascade ranges, the gleaming Puget Sound country and its myriad islands.

U.S. Science Pavilion: Beneath five arching towers, a 10-million-dollar display tells the authentic story of man's newest knowledge of the universe. The Boeing Spacearium takes visitors on a simulated flight through outer space, realistically accomplished by the use of three-dimensional, 160-degree motion pictures.

Fun: Every day at the Fair is a "special day". Week-long state and foreign-national celebrations are held, with free performances of top stars in the Stadium in addition to the regular shows in the site. The Gayway amusement park, featuring a dozen-and-a-half custom-built thrill rides, combine the atmosphere of Copenhagen's famed Tivoli with the old-fashioned "meet me at St. Louis" midway.

Fair dates are April 21 to October 21, 1962. Esperantists would do well to come during the week-end of July 20-22 and take in the Fair in groups, making their headquarters either in Seattle or in Portland. If you plan to stay in Seattle, make your reservations the easy way by writing to: Expo Lodging Service, Seattle World's Fair, Seattle 9, Wash.

ESPERANTO EN NIA NACIO

Nia nacio estas unu el la plej grandaj en la mondo. La mond-vojaĝanto, kiel la jurnalleganto, scias ke ĝi estas ankaŭ la plej potenca nacio en la mondo, pro sia riĉo kaj sia kultura influo. Sed interne de nia nacio, la movado por internacia lingvo estas preskaŭ ignorebla. Ni pretendas ke Esperanto estas la plej valoro faktoro en internacia kulturo. Sed en la plej internacieca nacio de la mondo, ĝi estas apenaŭ konata. **Se oni kunmetus ĉiujn organizitajn esperantistojn en la tuta usona nacio, ili formus grupon malpli grandan ol la kongregacio de ĉiu el multaj establitaj lokaj preĝejoj.**

Ĉirkaŭ sesdekjarojn jam ekzistis organizita Esperanto-movado en Usono. Tiu historio estas plena de propagando, de kursoj—kaj de bataloj, disputoj, kaj furioza malamikeco. Nur unu afero tute mankas en la sesdekjara historio: bone planita, bone subtenanta, koordinita agado de la esperantistoj por krei movadon kapablan interesi la publikon.

Mi deziras alvoki vin, nun, establi tion agadon.

Mi deziras alvoki vin, helpi krei nacian Esperanto-movadon kiu dum la venontaj kvin jaroj povos fari kion ne faris la movado dum la sesdek jaroj antaŭ nun.

La programo, kiun mi proponas, estas jena: membriĝo en la oficiala land-asocio, la **Esperanto-Ligo por Norda Ameriko**; kompetentiĝo en la uzado de Esperanto; diskonigado en la regiono en kiu oni loĝas; loka agado por instrui Esperanton. Ĉu nenio en tiu plano ŝajnas nova al vi? Ĉu tuj eniras vian menson la penso, "ĵam ni faras tion de sesdek jaroj?" Rigardu kelkajn detalojn.

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko: Neniu scias kiom da esperantistoj ekzistas en Usono. Ĉi tiu gazet-numero iras al ĉiu esperantisto kies nomon kaj adreson ni havas. Sed supozeble ekzistas du aŭ eble eĉ tri mil. kiujn ni ne

konas. Por mallonge, konjekti, povas esti kvar mil esperantistoj, kiuj povus membriĝi en landasocio. Ĉu vi scias kiom granda estas la plej granda landasocio esperantista en la mondo? Rigardu la UEA-statistikojn, se vi deziras ŝokon. Tri mil membroj en usona landasocio ne farus ĝin la plej granda en la mondo, sed ĝi estus tre proksima al tio.

Se vi estas membro de la oficiala land-asocio, E.L.N.A., vi estas samtempe asocia membro de la **Universala Esperanto-Asocio**. Tio rajtigas vin uzi la servojn de pli ol tri mil delegitoj en pli ol sesdek landoj; ĝi rajtigas vin uzi la tre bonan magnetofonan servon de U.E.A.; ĝi rajtigas vin uzi la mondvastan korespondservon. En unu frazo: via membreco en E.L.N.A. donas al vi la eblon uzi vian scion pri Esperanto ĉie en la mondo, sen peno. Vi ne plu estas izolita Esperanto-parolanto, sed esperantisto kun mondvastaj Esperanto-kontaktoj. Iuj eble opinius ke tio mem valoras la membrecon.

Se vi estas membro de la landasocio, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, vi ricevas regule bone presitan gazeton, kiu publikigas almenaŭ sesfoje en ĉiu jaro novajn materialojn en Esperanto kaj pri Esperanto; estas membro de politike neŭtrala grupo, kiu lasas al la individuaj konsciencoj de siaj membroj decidi ĉu aŭ ne havi politikajn vidpunktojn; (Ne en ĉiu lando de nia mondo ekzistas simila eblo.) subtenas la publikigadon de helpiloj por la propagando de Esperanto, ekz. la informlibro "Esperanto Your Passport to World Friendship" aperinta la pasintan aŭtunon, kaj la nun pretigata "Manlibro por Lokaj Grupoj".

Ĉu Esperanto meritas stagni dum sesdek jaroj pli? Aŭ ĉu ĝi meritas esti konata de la personoj de nia nacio? En la manoj de la kvar mil usonaj esperantistoj kuŝas la decido: kooperante inter si, formi el la oficiala land-asocio voĉon kaj agilon por la diskonigo de Esperanto en Usono;

aŭ lasi la laboron al la "aliaj personoj" kies ekzisto estas nur en la fantazio.

Kompetiĝo en la uzado de Esperanto: "Esperanto estas vivanta lingvo kaj postulas vivantaj animojn kiel siajn porbatalantojn—ne homojn kun ciferoj pri la akiroj de aliaj . . . Ni do akiru **povoscion**, praktike fluparoli la lingvon, kaj impresu demandantojn per ĝiaj belsoneco kaj esprimkapablo." F. R. Banham skribis tion, i.a., en artikolo aperinta en la januara numero de nia Revuo. Esperanto-movado nur povas konsisti el personoj kapablaj uzi Esperanton. "Esperantisto estas persono kiu parolas Esperanton." La usona publiko neniam serioze rigardos Esperanton, ĝis pli da personoj parolos per ĝi ol pri ĝi. Se vi ne parolas ĝin, senerare kaj senembarase, ĉu vi praktikas kaj studas por kompetentiĝi? Entuziasmo multon valoras. Sed neniu fidus entuziasmon kiu klopodas trudi al aliaj personoj kion la entuziasmulo mem ne faris.

Ĉu Esperanto stagnos dum sesdek jaroj pli? Aŭ ĉu la membroj de niaj kluboj kaj la propagandantoj en niaj urboj pruvos al la mondo ke Esperanto estas parolata lingvo kaj ne nur diskutata idealo?

En ĉiu numero de la Revuo aperas artikoloj celantaj helpi la studenton. Per tio la membroj en via grupo, eĉ vi mem, povas senkoste kaj senĝene plivastigi vian kompetentecon pri la uzado de Esperanto.

Diskonigado en la regiono en kiu oni loĝas: en kelkaj urboj, individuoj kaj grupoj kune laboras por konigi Esperanton. En ĉi tiu gazet-numero artikolo pri la grupo en Portland, Oregon, ekzempligas unu specon de tia laboro. Sed se tio okazas en nur kelkaj urboj, **nacia** movado ne ekzistas. Se la grupo en via urbo organizas Esperanto - kursojn regule; presigas sian nomon en la telefonlibro; sendis Esperanto-libroliston al ĉiuj librovendejoj kaj stokas Esperanto-librojn por mendantoj; okazigas ĉiujare ekspozicion en publika loko (biblioteko, foiro, preĝejo, aŭ sim.); parolis kun la bibliotekistoj en ĉiu

biblioteko por certigi ke Esperanto-lernolibro kaj la Esperanto Review troviĝas tie; informas la ĵurnalojn pri specialaj eventoj; reklamas en la ĵurnalo antaŭ ĉiu kurskomenco; havas afiŝojn (bone preparitajn) en la fervojstacioj, omnibusstacioj, kaj aerodromoj, kiel ankaŭ la kolegioj; sugestas al la lernejoj ke oni pretas paroli pri Esperanto,—se via grupo faras tion, ĝi faras la minimumon de diskonigado.

Loka agado por instrui Esperanton: ĉiu loka grupo bezonas almenaŭ kvar lertajn Esperanto - instruistojn, kapablajn mem paroli kaj skribi senerare, por instrui kvar kursojn ĉiujare. Se ĉiun trian monaton komenciĝas kurso por novuloj, kaj ĉiu kurso daŭras unu jaron (minimuma periodo por efike kapabligi personojn skribi kaj paroli Esperanton), via grupo denove faras la minimumon por krei Esperanto-movadon en via loko.

En unu jaro instruatoj lernas bone paroli kaj skribi. Se kurso komenciĝas ĉiun trian monaton, novinteresiitoj ne bezonas longe atendi antaŭ ol komenci kurson.

Kion ni ne havas, sed bezonas? La movado en Usono urĝe bezonas: nacia korespond-kurson, prizorgatan de spertaj esperantistoj; nacia ekzamen- kaj diplom-sistemon, por instigi pli efikan lernadon de la lingvo; **bonajn kaj ĝisdatajn** leksikonojn angla-esperantan kaj Esperanto-anglan; regulajn reklametojn en naciaj gazetoj; radio-programojn en Esperanto, aŭdeblajn en Usono; lokan grupon en ĉiu grava urbo.

Bonvolu pensi, serioze: ĉu estas unu sola afero, en ĉi tiuj du paĝoj da sugestoj por koordinita Esperantomovado usona, kiun ni ne rajtus supozi jam nepre ekzistanta post sesdekjara historio? Kaj ĉu vi (kiu legas ĉi tiun artikolon, do ja sufiĉe interesiĝis pri Esperanto por lerni legi ĝin), sekrete, interne de vi, ne vere miras ke post sesdek jaroj da Esperanto-laborado ĉi tia artikolo ankoraŭ estas bezonata?

Ĉu vi akceptas labori kun ni, por krei Esperanto-movadon en Usono?

PORTLAND ESPO

In August, 1961, the East Portland chapter of United World Federalists, an organization which seeks to strengthen the United Nations into a world government, decided to sponsor an Esperanto class as one means of promoting the sense of world community. With Len Hunting as instructor and Jim Deer as coordinator, use of a classroom at Portland's Reed College was obtained and news release invitations were sent out in an effort to fill the room's 25 person seating capacity, if possible, and so have a sufficiently large class to make it interesting.

Little did they expect the 125 interested people who in fact did show up on the first day of the class. After things quieted down, the course was transferred to the chemistry auditorium. Some 60 people actually completed the course. Long before it was completed, many of the students put the question, "OK, so now I'm learning Esperanto; where do we go from here?" By unanimous consent, the group at the end of the course formed itself into the Portland Area Esperanto Club, and adopted the acronym ESPO, standing for Esperanto Society of Portland, Oregon. It is best described as a metropolitan area club however, since its active members also come from the nearby towns of Milwaukie, Canby, etc. Officers for the first half of 1962 are Jim Deer, Chairman; Len Hunting, Vice-Chairman; Evelyn Deer, Secretary and Treasurer; with Don Kvernvik, Annette Greenland and Joseph Blanc serving on the Executive Board. The club now meets once a month and draws interested Esperantists also from nearby Salem. Main activities for the Spring 1962 season include developing skills in Esperanto conversation. One of their proudest efforts has been the stimulation of the formation of a Worldview Committee, including both Esperantists and non-Esperantists, to promote communication and exchange of views with persons in other lands. The equinoxes and solstices have been selected as Worldview Days, or

Mondvida Tago, as occasions to consider one's role as a world citizen, and to exchange greetings and ideas with distant friends.

On 24 March, celebrating the Spring equinox, the group carried out very successful simultaneous Mondvida Tago ceremonies with the Sapporo Esperanto Club in Portland's sister city, Sapporo, Japan. The programs included an exchange of colored slides, and tape recordings containing greetings and Esperanto songs. The Sapporo and Portland clubs are currently investigating the possibility of holding Mondvida Tago ceremonies with an Esperanto Club somewhere in Russia, at the summer solstice, in June.

As a means of acquainting Portland Esperantists with others in various parts of the country and as a means of calling Esperanto to the attention of the general public (and particularly to grade school teachers), ESPO is sponsoring a summer workshop, The World's Fair Summer Workshop, July 20, 21, and 22. Esperantists from everywhere are invited to make this a point of contact with friends from other locations. Evelyn Deer, ESPO secretary, points out that while reservations are very hard to get in Seattle, there are plenty available here in Portland. One can leave Portland at 7 in the morning, spend 8 hours in Seattle, and arrive back in Portland at 11 that night.

More information may be obtained by writing:

Evelyn Deer, ESPO secretary,
12946 N.E. Hancock St.,
Portland 30, Oregon, AL 4-8134.

★ ★ ★ ★ ★

**The best argument
for Esperanto
is Esperanto itself!**

Key to Esperanto
now 25 for \$1.00

Conrad Fisher:

KIEL MI FARIS EN MIA URBO

Mi tute sola aranĝis por prezenti f-inon Joŝiko Kajino antaŭ virinaj grupoj en mia urbo. Unue, mi intencis persone viziti ĉiun grupon kaj renkonti la prezidantinojn de la programa komitato, kaj tion mi faris pri la skoltinoj de mia konteo, kaj pri la Meadville Virina Klubo. Tamen, mi decidis, ke tia agado forrabus multe da tempo (kion mi ja ne povas elspezi).

Tial, mi sendis anoncon al la loka ĵurnalo, kun mencio, ke oni rajtas inviti f-inon Kajino por apero antaŭ grupoj. Mi ankaŭ sendis leteron al s-ino Dorothy Fuldheim, kies programon oni rigardas televide kvinfoje ĉiusemajne en mia regiono. Mi ricevis invitleteron de s-ino Fuldheim, kun peto, ke mi sciigu la daton kiam Joŝiko estos en ŝia urbo.

Antaŭ la anonco en la ĵurnalo kaj la korespondado kun s-ino Fuldheim, mi proponis al la aliaj instruantoj de mia preĝejo, pri ebleco ke Joŝiko aperu en nia preĝejo. La virinoj tuj jesis.

Responde al mia anonco en la ĵurnalo, mi ricevis tri telefonalkvokojn: la Dorcus-Societo de la Unuiĝinta Presbiteriana Preĝejo en urbo dek mejlojn okcidente, virina klubo de malgranda komunumo proksimume samdistance for, kaj la nove fondita Sertoma Klubo en la urbo mem. Nur la lasta proponis fari aranĝon kiu dependus de la veno mem de f-ino Kajino. La aliaj diris, ke ili deziras akcepti ŝin je difinita dato.

Mi skribis leteron al la Drakewell Memorial Museum, apud Titusville. La kuratoro respondis, ke oni tre ĝojos akcepti f-inon Kajino. Dua letero sekvis kun promeso persone akcepti kaj gastigi ŝin, kaj sciigis, ke la ŝtata fako volas dissendi raporton kaj bildon al ĵurnaloj tra la ŝtato.

Mi decidis paroli telefone al esperantistino, s-ino Lorraine Lewis, ELNA-anino kiu laboras en la reklamfako de la ĵurnalo, kaj peti, ke

ŝi faru por mi liston de ĉiuj virinaj grupoj, preĝejoj, "servkluboj", en la proksimeco de la urbo, al kiuj mi sendos invitleteron, petante, ke ili sciigu al la anoj, ke ni bonvenigos ilin al nia kunveno. Poste, mi telefone rezervis por publika kunveno la kunvenejon en la kontea juĝejo. Tiu ĉambro estas senkosta por la publikaj kunvenoj, se oni ne postulas enirkotizon.

Aerpoŝta letero de Joŝiko sciigis min ke ŝi povos esti en mia loko nur en semajno pli malfrua ol la planita. Tial, mi devis telefoni denove. Kaj mi devis limigi ŝiajn aperojn, sed atendi ĝis aŭtuno por plena semajno da aperoj.

Jen vi scias, kion vi mem povas fari, kaj kiel, por aranĝi aperojn de nia kara japana samideano en via loko.

Atentu kelkajn gravajn avertojn: Joŝiko ne postulas enirkotizojn, sed ni almenaŭ devus aranĝi ke la grupo por kiu ŝi aperas pagu al ŝi malgrandan honorarion (almenaŭ \$5), kaj ni mem devus simile helpi. — Joŝiko ne parolas angle, do ŝi ne estas intervjebla angle, kaj ne povas komprenigi sin angle. Bonvolu kontakti Catherine Schulze (407 Darrell Rd., Hillsborough, California) aŭ Conrad Fisher (808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania) anstataŭ skribi rekte al f-ino Kajino. Si ne kapablas legi aŭ skribi angle, kaj ne havas sufiĉan tempon por vaste korespondadi. Ni ĉiam akurate informados ŝin pri la aranĝoj.

Ni Rekomendas

DANA ANTOLOGIO

Bele presita kaj bindita libro, kun 259 paĝoj da vere brilaj tradukoj el la proza kaj poezia literaturoj de Danlando. Entute, legendaj tradukoj, sperte faritaj de tre kompetentaj esperantistoj. Neologismoj ne abundas por ĝeni facilan legadon. Kosto, \$3.30.

TADROS MEGALLI 50-JARA

La 28an de aprilo egipta samideano Tadros Megalli festis sian 50 jaran jubilean naskiĝtagon.

Li komencis lerni Esperanton en novembro, 1928, per koresponda kurso. En 1932 li fondis la unuan Esperanto-grupon en sia naskiĝurbo Fajum (Egiptujo). En 1940 li transiris al la ĉefurbo Kajro, kie li refondis la Egiptan Esperanto-Asociion. Li kunlaboris por starigi Esperanto-klubon por militkaptitoj kiuj volis lerni Esperanton. Li dediĉis sian tutan liberan tempon por Esperanto, tiel ke la fajmanoj lin nomis "S-ro Esperanto". Dum sia restado en Kajro li studis psikologion kaj akiris la diplomon Doktoro pri Psikologio.

Instigita de kelkaj mondvojaĝantaj esperantistoj kiuj vizitis Egiptujon (i.a. Joseph Sherer, el Usono, 1931; Edmund Zscheile, el Germanujo), li komencis mondvojaĝon en 1949. Li vizitis 14 eŭropajn landojn. Li ofte vojaĝas al Egiptujo kaj aliaj arabaj landoj por kolekti materialon por siaj prelegoj. Li posedas nun pli ol 1,200 kolorajn lumbildojn kaj 8mm. kolorfilmon kiujn li mem fotografis. Li donis ĝis nun pli ol 2,500 prelegojn.

Tadros Megalli ankaŭ estas kores-



Tadros Megalli

pondanto de la semajna araba gazeto **Watani** en Kajro, kaj li ofte skribas en multaj germanaj gazetoj. Li prelegas pri kvin diversaj temoj, kaj volonte ricevas invitojn prelegi en Esperanto-grupoj aŭ kulturaj organizoj. Krom en Esperanto, li kapablas prelegi ankaŭ angle, france, germane, arabe, kaj itale. Oni povas skribi al li laŭ la adreso: D-ro Tadros Megalli, Munsing am Starnberger See, (okcidenta) Germanujo.



BILD-LIBRO PRI BESTOJ

Ĉi tiu belega verko rakontas, sur 80 allogaj paĝoj, la historion pri la bestoj de la mondo. Troviĝas pli ol 400 bildoj—ĉiuj en naturaj koloroj—inkluzive de goriloj de Kongo, tigroj de tropika Afriko, birdoj de Sud-Ameriko kaj fiŝoj el inter la koralrifoj de la Ruĝa Maro. Priskriba teksto estas verkita de sperta zoologo.

Mendu ĉi tiun libron (kosto: \$3.00), kaj ĉiun esperantan libron, de la Esperanto League Book Service, Madison, Wisconsin.

Martha Walker:

KARTLUDO "DONU AL MI!"

Oni povas aĉeti bildajn glumarkojn kun bildoj pri bestoj, birdoj, kaj floroj. La Dennison Company publikigas libretojn da tiaj glubildoj. Se oni uzas tiujn libretojn, aĉetu kvar.

Pretigu 72 malgrandajn kartojn (proksimume samgrandajn kiel ordinaraj ludkartoj). Gluu en la centro de ĉiu karto unu bildon. Sube, skribu preslitero (per nigra inko, se eble) kaj **fonetike**, la nomon de la birdo, besto, aŭ floro. (Ni uzis: elefanton, strigon, leonon, simion, hipo-



potamon, cikonion, aglon, kolombon, narcison, rozon, trikoloran violon, tigron, lekanton, ĝirafon, pavon, cignon, miozoton, kaj dianton.)

En la supra, maldekstra angulo skribu per malgrandaj presliteroj la esperantan nomon.

Skribu la samon rekte super la bildo.

Faru kvar identajn kartojn por ĉiu birdo, besto, aŭ floro, tiel ke estas 18 serioj da kvar kartoj. La kvar kartojn oni nomas "unu libro," do estas entute 18 libroj.

Reguloj: La celo de la ludo estas, ke ĉiu ludanto faru "librojn". La persono kiu faris la plej grandan nombron estos la venkinto.

La estro disdonas al ĉiu ludanto kvin kartojn. (Se ludas malpli ol kvar personoj, flankenmetu kelkajn "librojn" por pliiĝi la intereson.) La ceteraj restas meze de la tablo.

La ludanto ĉe la maldekstra flanko de la estro ludas unue. La ludanto postulas de alia ludanto, tiel: "Donu al mi leonon" (aŭ kiun ajn deziratan karton). Se la persono havas la postulitan karton, tiu diras "Jen la leono" kaj donas ĝin al la postulinto. La postulinto povas postuli pliajn kartojn, ĝis aŭdiĝas la respondo "Mi ne havas ĝin." Se persono ne havas postulitan karton, la ludanto devas preni la supran karton de la grupo sur la mezo de la tablo. Ĉar tiuj kartoj kuŝas kun nur la dorso vide-



bla, neniu scias kiun karton prenas la ludanto.

Post tio, la ludanto maldekstre de la unua ludas.

Atentigo: zorgu ĉiam prononci ĝuste la nomojn. laŭ la fonetika skribo.

Ĉi tiu kartludo instruas prononcon, kaj la uzon de la akuzativo.

★	★	★
★	★	★



ESPERANTO NEWS NOTES

U.N.E.S.C.O. now includes Universala Esperanto-Asocio in category B of organizations with which it has consultative relations. (Other categories are A, groups formed by U.N.E.S.C.O. itself; and C, groups with which U.N.E.S.C.O. exchanges information.) This decision is the result of collaboration between the two organizations since 1954.

The Swiss postal administration, in cooperation with the Swiss Esperanto Society, is using a special postmark during this year, the 75th year since the appearance of Esperanto. The postmark includes a picture of the author of the language, L. L. Zamenhof.



In Graz, Austria, two new Esperanto courses have been established in the principal schools. The courses are elective, and are taught for two hours each week. Costs are paid by the Graz school administration.

August 12 - 17, in Frostavallen, Sweden, the annual Esperantist gathering will center around the work of U.N.E.S.C.O. At the same time, the new program of the Universala Esperanto-Asocio will be considered, and a meeting of the representatives of the information bureaus of the various national Esperanto organizations will be held.

Esperanto Lane is the name given, in January, to a street in Dordrecht, Holland. This must be added to the list which appeared in the last two issues of the Esperanto Review.

ESPERANTO EN KOMERCO


is the name of a new 105 page book in five languages, which reports on the experiences of 80 commercial enterprises which use Esperanto (among them Fiat, Philips, Gevaert, Ytong, etc.). Compiled in Esperanto, English, French, Spanish, and German by Bruno Vogelmann, and published by the Esperanto-Rondo, Crailsheim, Germany, the price is 1.5 Gm. Mk. (about 40 cents).

Joŝiko Kajino, charming young newspaper woman from Japan, is currently making a tour of the United States using Esperanto. In the San Francisco area she spoke 20 times before more than 1,350 people. Interviews were broadcast by KCBS and KGO, and printed by the Menlo Park Recorder and two Japanese language newspapers.

The Czechoslovakian Post Office for the first time has published a postage stamp with text in Esperanto. It is one of a set of eleven advertising the Universal Exhibition of Postage Stamps. This brings to twenty-five the number of stamps issued honoring Esperanto or its



author, Zamenhof. Previous stamps were issued by Brazil, Bulgaria, Hungary, Poland, Austria, Yugoslavia and the USSR. (A complete list appeared in the Esperanto Review, Sept., 1961.)



Joŝiko Kajino

A film in Esperanto, prepared by the public relations department of the Ministry of Post, Telegraph, and Telephone, in France is available on loan showing the work of French postal officials. The 16mm., 15 minute long film may be had free, on loan, from the Franca Esperanta Poŝtasocio, 20 Ave., de Ségur, Paris 7, France.

★ ★ ★
★ ★ ★

SOLVO DE LA ENIGMO EN LA JANUARA NUMERO

- | | |
|--------------|--------------|
| 1. kropo | 16. espero |
| 2. obstaklo | 17. ĉamo |
| 3. nabo | 18. atomo |
| 4. trilo | 19. nusko |
| 5. ekstazo | 20. ĝangalo |
| 6. napo | 21. entjero |
| 7. tento | 22. lento |
| 8. ibiso | 23. omaro |
| 9. grako | 24. neĝo |
| 10. ikono | 25. erco |
| 11. ĉiĉerono | 26. pelikano |
| 12. identa | 27. osto |
| 13. urso | 28. vaflo |
| 14. juvelo | 29. akrido |
| 15. navo | 30. sano |

La proverbo: Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas.

Sendis ĝustan solvon: **Martha Walker, Robert Runser, Simon Zemojda**

Another Esperanto film is available for showing without charge. The film, "Germoj de Lumo," is a 25 minute 35mm or 16mm color sound film, and is available from N. V. Gevaert Foto - Produkten, Dienst Publiciteit, Septestraat, Mortsel, Belgium. The film tells and shows how to take vacation films. To borrow the film, write in Esperanto to Gevaert.

A catalog of Esperanto Stamps is available, for \$1.00, from Reinhold Jensen, Ringgade 77, Aarhus, Denmark.

Lynwood, Washington, reports a new beginners' Esperanto class begun as a result of a talk given in nearby Edmonds, at the Edmonds Unitarian Church, by Leonard Hunting of Portland, Oregon. Teacher of the new group is Suzanne Walter.

The San Juan Unified School District, in California, has organized five foreign language courses at the Mira Loma and Bella Vista High School adult education centers. The courses include classes in Spanish, French, Russian, German, and Esperanto, emphasizing the conversational approach.

★ ★ ★
★ ★ ★

Ĉu vi planas flugi al la Universala Esperanto-Kongreso en Kopenhago? Ges-roj Murray, el Arcata, Kalifornio, planas flugi de la ELNA-kongreso en Chicago al la Universala Kongreso. Se aliaj deziras samon fari, ili povos ŝpari ĝis \$285 por ĉiu persono se ili flugos kune kiel grupo. Almenaŭ 25 personoj devos partopreni la grupon. Se vin interesas la Chicago-al-Kopenhaga Karavano Jet-aeroplana, kontaktu S-inon Murray, 1661 E St., Arcata, California.

Nova Disko, "Enigmista Junularo" estas havebla je kosto de 5 respond-kuponoj (65 cendoj). Mendu de Sfinge Manzonia Enigmistica, Via Antonio Ghislanzoni 25, Lecco, Como, Italio.

(for members only)

1962 ELECTION OF OFFICERS

The candidates listed below were named by the Nominating Committee (Vincent Griffith, Chairman) as provided in the constitution of E.L.N.A. Each member in good standing may vote. Mark, but do not sign, your ballot. Enclose the ballot in an envelope and on the outside of the envelope write your name and address. Mail to: **Secretary, Esperanto League for North America 1962 Convention, 17958 Homewood Avenue, Homewood, Illinois.** In the lower left hand corner write, "Ballot—to be held until July, 1962." Do not enclose other correspondence in the envelope with your ballot. For man-and-wife joint memberships, or those not wishing to cut the pages of this magazine, additional ballots may be obtained by requesting them from the League Headquarters, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

B A L L O T, 1 9 6 2


Esperanto League for North America

For **Secretary** (vote for one):

CONRAD FISHER, Meadville, Pennsylvania
.....

For **Executive Committee** (vote for three):

DAVID CARSON, Greenfield, Mass.
THOMAS GOLDMAN, Bethesda, Md.
DOROTHY HOLLAND, Fayetteville, Ark.
EDWARD PHARO, Jr., Somerton, Pa.
ROAN ORLOFF STONE, Gallup, New Mexico
.....
.....
.....



POR - INFANA LIBRO

La **Ŝtelita Lampo**, eldonita de la Eldona Sekcio de la Slovenia Esperanto-Ligo, Poŝtfako 275, Miklosiceva 7/1, Ljubljana, Jugoslavio. Kosto, 65 cents. Kun koloritaj bildoj. Interesa kaj alloga libreto pri mirakla lampo kaj fluganta tapiŝo. Taŭga por proks. 10 jara infano.

Mendu ĉi tiun libron de la
Esperanto League Book Service, Madison, Wisconsin.

THE REVIEW AND THE LEAGUE

Are you a subscriber to this magazine? If not, you may wish to receive it regularly, six times a year, keeping you informed of Esperanto and its movement. You may also wish to become a member of the Esperanto League for North America, thereby not only supporting the movement for Esperanto in America, but also entitling you to use the world-wide services of the Universala Esperanto-Asocio. A year subscription costs \$2.00; membership costs \$5.00 per year (including subscription). Orders should be sent to the treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington.

CONVENTION TIME IS ALMOST HERE!

HAVE YOU REGISTERED YET?

The 10th annual ELNA Convention will be held at the Hamilton Hotel in the heart of downtown Chicago, July 6-8, 1962.

The meeting rooms are all air-conditioned. Private rooms at the following prices (or higher) are also air-conditioned: Single room, \$8; double room, \$11.50; twin-bedded room, \$13.50. When you register with the Convention Treasurer, a Hamilton Hotel reservation blank will be sent to you.

We hope many of you will come early and vacation in Chicago. The entertainment committee has planned activities, including picnic, boat ride and free tours (except possible minor fees) for Sunday, July 1, and all succeeding days before the Convention. However, to take advantage of some of these, enough people must signify in advance their desire to participate.

COME and exchange ideas! COME and enjoy Chicago! COME and meet your fellow Esperantists! COME and contribute your enthusiasm and talent to our Convention's success and help make it an achievement for Esperanto!

Don't wait! Fill out the coupon below and mail immediately!

(Detach and mail.)

Mr. F. D. TURNER
Convention Treasurer
215 S. 3rd Avenue
Maywood, Illinois.

(Please make checks
payable to F. D. Turner.)

I wish to attend ELNA'S 10th Convention, July 6-7-8-, 1962.

.....Check for \$10 registration fee is enclosed.I will pay later.

Please include me in plans for pre-Convention tours, etc., for:—

Sun. July 1....., Mon., July 2....., Tues., July 3....., Wed., July 4.....

Thurs., July 5.....

Print Name.....

Address.....

Bill Schulze:

THE OAK AND THE REED

A simple tale for beginning readers
in Esperanto.

A proud Oak grew upon the bank of a stream. For a hundred years it had withstood the buffeting of the winds, but one day there came a violent storm. The great oak fell with a mighty crash into the swollen river and was carried down toward the sea.

Later the oak tree came to rest on the shore where some reeds were growing. The tree was amazed to see the reeds standing upright.

"How ever did you manage to weather that terrible storm?" he asked. "I have stood up against many a storm, but this one was too strong for me."

"That's just it," replied the reed. "All these years you have stubbornly pitted your great strength against the wind. You were too proud to yield a little. I, on the other hand, knowing my weakness, just bend and let the wind blow over me without trying to resist it. The harder the wind blows, the more I humble myself, so here I am."

Moral: It is better to bend than to break.

MALLONGAJ NOTOJ

Radio-amatoroj atentu: komunikas W8BBP (Conrad Fisher): "En la unua (kaj ĝis nun sola) radioamatora bulteno, Esperanto CQ (de S-ro Richardson, W7LLV, Seattle), mi trovis kelkajn adresojn de usonaj amatoroj kiuj parolas esperante. Al tiuj mi skribis. La rezulto estas ĉiumarda parolado de Esperanto per la radio-ondoj, inter mi kaj Howard Grams, K7JNX, South Dakota. Ni tre ŝatus ke ankaŭ aliaj esperantistoj partoprenu la kontaktojn, kaj eble paroli al amatoroj kiuj intereson havas pri nia lingvo. La "Espĉrantohoro" estas 1815 GMT, je ĉiu mardo. La frekvenco estas 14.260 megacikloj.

LA KVERKO KAJ LA AKVO - HERBO

Simpla rakonto por personoj
komencantaj legi Esperanton.

Fiera Kverko kreskis sur la bordo de rivero. Dum jarcento ĝi rezistis la frapadon de la vento, sed unu tagon okazis fortega ŝtormo. La granda kverko falis en la torentan riveron kun granda bruo, kaj forportigis al la maro.


Poste, la kverko jetiĝis sur la riverbordon kie kreskis akvoherboj. La arbo miregis vidante ke la herboj staras vertikalaj.

"Kiel vi sukcesis travivi tiun teruran ŝtormon?" li demandis. "Mi staradis kontraŭ multaj ŝtormoj, sed tiu estis tro forta por mi."

"Estas tial," respondis la herbo. "Dum tiom da jaroj vi obstine kontraŭmetis vian grandan forton kontraŭ la vento. Vi tro fieris kaj rifuzis cedi iomete. Male, komprenante mian malforton, mi nur fleksiĝas kaj permesas ke la vento blovu super mi sen rezisto. Ju pli forte blovas la vento, des pli mi humiligas min; do mi restas."

Moralo: Estas pli bone fleksiĝi ol rompiĝi.

En la Universitato Harvard, post kvinjara manko de agado, du studentoj (Jonathan Pool kaj Russell Stevens) fondis klubon en nov. 1961. En novembro ĝi oficiale sankciigis kiel studenta organizo. La klubo (plejparte per aĵoj pruntedonitaj de D-ro Lieberman) okazigis grandan ekspozicion en la Biblioteko Lamont. Poste la ekspozicio estis en la ĉefa biblioteko de la Massachusetts Institute of Technology, kaj la publika biblioteko de Bostono. Oni disdonis proksimume 1,200 informilojn de la februara studenta registriĝo. La Boston Herald presis leteron de klubano Joseph Knowles pri la uzo de Esperanto anstataŭ la latina. La klubo anonciĝadas en la studenta kalendaro, la universitata bulteno, kaj la Harvard Crimson.



FROM THE SECRETARY

Reports and articles about Esperanto are less likely to be published in local newspapers than are letters to the editor. Many such letters have appeared in our newspapers, resulting in our receiving many requests for further information. However, if news items are to be sent to a newspaper, they are more likely to be published if they are sent as local club news by persons where such local Esperanto clubs exist. For example, when enough time has passed without a letter or report in the local paper in Meadville, I write something like this:

Esperanto Group Discusses New Postage Stamp

Members of the Esperanto group met in the home of . . . (address) . . ., for a conversational session, in preparation for the coming visit of Miss Yoshiko Kazhino, a newspaper-woman from Japan. Among other subjects discussed in Esperanto were the new postage stamps issued by the postal department of Czechoslovakia to advertise and honor the Universal Exhibit of Postage Stamps in Prague. There are eleven varieties in the new set, each with a dif-

ferent illustration and wording in Czech and another language. The stamp with Esperanto wording bears this phrase: "Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj". This is the first Esperanto stamp issued by Czechoslovakia, which now is the eighth to issue stamps. (The first was in 1925.)

Esperanto has been used by the Voice of America, which has received about two thousand letters from its listeners in 85 countries. The United States Information Service has been planning an Esperanto volume to tell the story of "Dokumentoj de Usona Demokratio" (Usono = United States).

Of course, you must not feel hurt if the reporter who takes care of your report rewrites it. This may be a good thing, for he can give it a greater impact than you, the original writer, might do.

Each time an important event occurs regarding Esperanto, you can use this same method to get it into the local papers. Then, be sure to include a local address for readers to contact you for more information on Esperanto.

Havigindaj broŝuroj en Esperanto konstante aperadas. Ni rekomendas la sekvantajn: (Kaj se vi estas instruisto, vi eble deziras arangi ke viaj lernantoj ankaŭ havu ilin).

"Faktoj Pri Germanujo" (dua eldono). 80p., dika kovrilo, senpage havebla ĉe la Gazetara kaj Informa Oficejo de la Federacia Registaro, Welckerstr. 11, Bonn, Germanio.

"Malsupra Silezio Hieraŭ kaj Hodiaŭ." 128p. Kosto: 4 internaciaj respondkuponoj. Mendu de la Pola Esperanto-Asocio, Ulica Dubois 3, Polio.

"Aachen." Petu ĝin de la Kurund Werbeamant der Stadt Aachen, Ursulinerstr., Aachen, Germanio. Ne pre atentigu ke vi deziras la "Esperanto-gvidilon."

"Antverpeno Atendas Vin," de la Urba Servo por Turismo, Pelikaanstr. 6, Antwerp, Belgio.

"Bruselo," de la Centre d'Information de Bruxelles, 10 Rue du Chene, Bruxelles 1, Belgio.

"List auf Sylt"—en germana lingvo kun ankaŭ esperanta teksto. De la Nordseebad List auf Sylt, Schleswig-Holstein, Germanio.

Donald Broadribb:

LA PECO DE POTO

Vespere,
La 19an de marto.

Estimataj Kolegoj,

Mi skribas ĉi tion por vi, por ekpliki pri kio okazis. Mi scias ke vi dubos pri miaj diroj, sed mi certigas al vi ke ili estas veraj. Dum mi atendas en mia oficejo en la Orienta Instituto, en Chicago, mi skribos por vi la detalojn de ĉi tiu tre stranga epizodo.

La komenco okazis antaŭ tri tagoj, dum la posttagmezo. Mi sidis en mia oficejo, telefonante. La religiaraportisto de ĵurnalo ĵus lernis, de kvin jarojn tro malfrue, pri la manuskriptoj trovitaj apud la Morta Maro en Palestino. Li volis ke mi diru en mallonga paragrafo ilian tutan signifon. Senpage, mi supozis. Mi inklinis sugestii ke la raportisto studu en mia klaso pri tiu temo, sed mi sukcesis bridii min. Feliciĝe al mi, finigis la konversacion insista frapado sur la pordo. "Mi skribos leteron al vi," mi diris telefone, kaj formetis la parolilon. Al la pordo mi diris, "Envenu".

Aperis studento, membro de klaso mia pri antikvaj enĉizajoj. Lia ekscitita vizaĝo komprenigis al mi ke li ne deziras nur diskuti klastemojn. En sia mano li tenis ceramikan pecon ne malsimilan al peco de rompita poto. "Profesoro," li diris, fermante la pordon, "dum mi vizitis la muzeon, mi trovis ĉi tion sur la planko. Sendube mi devus redoni ĝin al la kuratoro, sed ĝi aspektas tiel stranga ke mi deziris unue peti ke vi klarigu ĝin por mi."

Mi prenis la poteron. Mi sciis ke en la arkeologia muzeo, sur la teretaĝo de la Instituto, estas ekspozicio de potrompaĵoj. Ili venis el la epoko kiam la modo estis skribi leterojn sur tiaj poteroj, antaŭ la kvina jarcento a.K. Supozeble ĉi tiu potero iel forfalis dum oni pretigis la ekspozicion.

Nur unu flanko estis kovrita de la

skribado. La inko uzita estis tre pala, tiel ke mi apenaŭ povis distingi ĝin. Kion mi ja povis vidi, mi ne sukcesis deĉifri. "Kion vi mem supozas pri ĝi?" mi demandis.

La studento ruĝiĝis iomete, kaj hezitis respondi. "Ĝi estas peco de poto," li diris, "kaj ĝi aspektas tre malnova, sed mi ne scias sufiĉe por diri ĉu ĝi aĝas tri mil jarojn aŭ nur sep cent. La skribon mi tute ne rekonas."

"Iom pli ni povas trovi," mi diris. "Tiun specon de inko mi neniam vidis post la sesa jarcento a.K. Kaj la skribo ne ŝajnas alfabetaj—vidu ke oni tre malofte ripetis signojn. Kaj ankaŭ rimarku: ĝi zigzagas. Oni komencas legi ĉe unu flanko, kaj sekvas la skribon supren kaj malsupren. Vi vidis tion en kelkaj tre fruaj ĉizajoj kiujn ni ekzamenis enklase. Sed oni tiuepoke ne skribis sur potoj. Lasu la pecon kun mi. Mi studos ĝin, kaj poste mem reportos ĝin al la muzeo."

La studento foriris, kaj mi meditis. Pluraj pensoj rampis en mian kapon. Eble temas pri ŝerco. Iuj studentoj volis trompi sian profesoron, do dum la nokto ili fervore preparis ĉi tion. Tio certe eblas. Mi mem, dum mia juneco, laboris dum du noktoj farante falsan antikvan manuskripton por trompi nian profesoron pri la greka lingvo.

Alia eblo estis ke ĉi tiu peco estas hazarde trovita potero de nekonata popolo, kiun la kuratoro erare supozis arama kaj intencis lokigi en la ekspozicio. Tio estis ne ridinda penso. Laŭdire, en la arkivoj de la Brita Muzeo kuŝas miloj da neniam studitaj manuskriptoj. Se iuj ekspertoj havus sufiĉajn monon kaj tempon por legi ilin, multaj mankoj en nia scio pri la historio de la mondo solvigus.


Tria eblo, ankaŭ konsiderinda, estis ke iu arkeologo senintence lasis la pecon dum li vizitis la muzeon. Eble li trovis ĝin ie, kaj portis ĝin al la

muzeo por kompari ĝin kun aliaj eroj. Tiukaze la ero certe venis el Azio, ĉar la Instituto ne inkludas neaziaĵojn.

Mi plurigardis la pecon. Mankis identiga numero, kiun kutime stampas la muzeo sur ĉion akiritan. Do probable ĝi estas ŝerco . . . aŭ senintence lasita de iu arkeologo.

La horloĝo anoncis al mi ke mi devos instrui klason post nur du

skriboj ne nur el Azi-Eŭropo sed ankaŭ kun la praamerikaj. Je la oka horo mi konsciigis ke mi atingis precize nenion, kaj ke estis malfrue. Mi ofte laboris ĝis malfrue en la Instituto, ĉar mi ne havas familion por okupi mian tempon. Miaj kol-egoj kutimigis al tio, kaj ne pensis averti min pri la malfrueco. Nun ĉiu jam estis for, kaj la koridorlumoj estis de longe estingitaj. Kun la potero en mia mano, mi marŝis tra



minutoj. Malvolonte mi metis la poteron zorge en tirkeston, prenis miajn klasnotojn, kaj iris tra la longa koridoro al klasĉambro kie atendis min dektrio da studentoj emaj lerni pri la historio de la popolo loĝinta en Aramo. Mi devis, do, dum kelka tempo forgesi la strangan pecon de poto.

Post la klaso, du studentoj volis paroladi kun mi. Post tio, kolego akompanis min al la restoracieto por trinki kafon kaj diskuti la baldaŭ farotajn ekzamenojn. Nur malfrue en la posttagmezo mi reiris al la oficejo. Kompreneble mi tuj prenis la poteron el la kesto kaj rekomencis ekzameni ĝin. Fojfoje mi konsultis librojn kaj denove studis la skribon. Certe nenion similan oni antaŭe trovis. Mia suspekto pri trompo komencis konfirmiĝi. Sed ankoraŭ mi malcertis. Tial mi laboradis. Mi kopiis la skribon per malpala, nigra inko. El ĉiu direkto mi studis ĉiun signon, komparante ĝin kun la pra-

la koridoro, funkciigis la lifton, kaj descendis al la teretaĝo.

Guste antaŭ ol malfermi la pordon por eliri al la strato, mi haltis. Ne-forta lumeto videblis en la muzeo. Surprizite, mi turnis min kaj paŝis al la muzepordo, kiu devus esti fermita sed kiu estis, anstataŭe, iom aperta. Videbla estis maljuna viro kiu zorge serĉadis laŭ la planko, sub la tabloj. Mi enpaŝis, samtempe lumigante la lampojn. "Ĉu mi povas helpi vin?" mi demandis.

La viro aŭdis min kaj leviĝis. Timo montriĝis sur lia vizaĝo; poste, estis miro kiam li vidis la poteron en mia mano. Sed li ne parolis. "Ĉu mi povas helpi vin?" mi demandis. "Se vi ne klarigos kial vi estas ĉi tie, mi devos venigi la policon."

La viro tremis, kaj hezitis. "Vi havas mian poteron," li diris. Liaj vortoj sonis kiel de fremdulo. Ĉu fremda arkeologo? mi pensis. Sed, se tiel, kial li ne venis dum la tago

kaj malkaŝe serĉis sian perdaĵon?

Mi inklinis ne doni ĝin al li sen pli detala ekspliko. "Ĉu via?" mi demandis. "Kial via?"

La viro tremis denove, sed ŝajne decidis ke ekspliko estas necesa. Sendube li konsciis ke mi nur devus laŭte krii, por venigi policiston. Liaj malrapide prononcataj vortoj komencis denove soniĝi. "Bonvolu pardoni min. Mi estas arkeologo, kaj mi ne povas veni dum la tago. Mi estis ĉi tie hieraŭ nokte, komparante kelkajn el miaj havaĵoj kun tiuj en la muzeo. Mi forgesis tiun eron. Do mi revenis nun por serĉi ĝin." Li vidis ke la ekspliko ne konvinkas min. "Mi vere estas arkeologo. Mi vizitas Chicagon nur dum tri tagoj: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ. Mi loĝas ĉe la universitato. Venu kun mi kaj mi montros al vi la aliajn poterojn en mia kolekto. Eble tio konvinkos vin ke mi parolas vere."

Mi ne scias kial mi ne tuj alvokis la policon. Eble ĉar li estis maljunulo, kaj oni malofte supozas ke maljunulo estas krimisto. Eble ĉar li ne estis armita. Eble ĉar mi sciis ke dum ni restos en la universitata regiono, mi ĉiam povos facile venigi helpon. Iukiale, mi akceptis lian inviton. Mi portis la poteron, kaj sekvis lin tra la pordoj. Ni eliris al la strato. La senluna nokto estis nigrega, sed la stratlampoj lumigis la trotuaron sufiĉe por ke mi povu facile rigardi lin. Maljuna, jes — eble sesdekjara. Bone vestita, kvankam tute ne mode. Li kondukis min trans la straton, cele al unu el la loĝejoj por studentoj. Dum ni pasis la bibliotekon, li haltis kaj gestis. "Mi loĝas tie," li diris, kun malforta voĉo.

Mi estas sufiĉe sperta por rezisti ektimon kiam mi unuafoje vidas ion tute novan. Mi estas certa, do, ke mi montris multe malpli da surprizo ol la maljunulo anticipis kiam li diris sian anoncon. Sed interne, tute ne estis kviete en mi. Antaŭ mi staris veturilo, malgranda spacveturilo, sufiĉe granda por enteni eble kvar aŭ kvin personojn. Neniu estis en ĝi.

La maljunulo denove parolis. "Eniru kun mi, mi petas. Mi ja promesis montri al vi."

Ni eniris. Interne, estis kelkaj benkoj, granda tablo, kaj pluraj kestoj. Akceptante inviton de la maljunulo, mi sidigis sur benko, dum li malfermis keston kaj elprenis dekon da potpecoj.

"Jen," li diris. "Ekzameni ilin, se vi deziras. Mi supozas ke vi scias iom pri la fako?"

Mi eksplikis al li mian profesion.

"Jes, do, vi sendube scias iom; iom, sendube. Sed vi neniam antaŭe vidis ĉi tiajn skribaĵojn."

Tio estis vera. Ĉiu el la diversformaj pecoj surhavis skribaĵojn similan karaktere al tiu kiun mi jam rigardis. Mi denove rigardis la spacveturilon, kaj divene sugestis, "Ili ne estas el nia mondo, mi supozas."

"Ne. Mi trovis ilin dum nia ekspedicio. Ni venas el alia stelsistemo, kaj ĉi tiu estas scienca ekspedicio. Ni estas biologo, kaj geologo, kaj mi. Mi trovis ĉi tiujn erojn sur alia planedo, la plej proksima al via." (Mi ne scias ĉu li parolis pri Venuso aŭ Marso.) "Mi klasifikos ilin poste, dum la vojaĝo hejmen. Nia ŝipo venis ĉi tien hieraŭ nokte. Mi jam diris tion al vi. Dum mi serĉis interesatojn, mi tute hazarde trovis vian muzeon. Ĝia ekspozicio de poteroj pensigis min ke eble la poteroj kiujn mi trovis havas ian rilaton kun tiuj en la muzeo. Eble raso de via mondo migris, iam, al la alia; aŭ simile. Ĉu vi havas historion de interplaneda migrado?"

"Ne."

"Bedaŭrinde." Li ĝemis. "Mi konvinkigis ke nenio en via muzeo similas al ĉi tiu skribado. Nu, miaj sciencaj kolegoj forrestos dum kelkaj horoj."

Mi interpretis al mi ke li deziras plubabiladi. Estas malfacile memori ĉion poste diritan. Mi lernis ke la malgranda ŝipo uziĝas nur por descendo kaj ascendo, dum la granda spacŝipo restas for de la planedo.

Oni venis dum la nokto por veki laŭeble plej malmultan atenton. Mia nova amiko estas profesoro en sia hejmlando—instruas nun jam de kvardek jaroj—kaj havas reputacion kiel grava arkeologo. Ni longe paroladis, tie, sidante sur la benkoj. Fojfoje mi memoris la celon de mia vizito, rigardi la poterojn, kaj denove komencis ekzameni ilin, sed baldaŭ nia konversacio venkis mian interesecon kaj ni nur paroladis.

Ĉirkaŭ la noktomezo mi estis tro laca por bone sekvi la paroltemon. Mi oscedis forte, kaj levis min. “Vi estos ĉi tie morgaŭ nokte, ĉu ne?” mi diris, paŝante al la pordo.

“Jes, ni restos unu nokton pli,” li respondis. “Post tio ni devos foriri. La vojaĝo hejmen daŭros longe.”

Mi petis permeson forporti kelkajn poterojn, promesante reporti ilin morgaŭ nokte. Mi tre deziris studi ilin. Probable la sciencistoj de la tero havos okazon denove vidi ion aliplanedan nur post multaj jardekoj. La maljunulo nun estis tute preta konsenti. “Sed nepre reportu ilin,” li diris, “ĉar mi ne deziras perdi ilin. Mi multe laboris por trovi ilin.”

Dum tiu nokto mi dormis malfacile. Kvankam mi estis laca, ekscito malebligis al mi profunde endormiĝi. Anstataŭe, en duondormo, mia menso kirlis kaj konfuzis okupiĝis pri spacŝipoj kaj potoj kaj ekspedicioj, sen kohero. Dum la posta tago mi klopodis plenumi miajn profesiajn devojn: instrui du klasojn, ĉeesti tedan konferencon, konsili vizitantajn studentojn en mia oficejo. Sed dum ĉiu libera momento mi elprenis la poterojn kaj denove studis ilin, kopiante la strangan skribon kaj meditante pri ĝia signifo. Kaj dum mi laboris, mi oscedis pli kaj pli unusola penso, “kiom pli da materialo estas studebla en tiu ŝipo, se mi nur. . . .” Kiam la nokto venis, mi jam estis firme decidinta.

Mi restis en la muzeo denove ĝis la oka horo. Kun la poteroj en mia mano, mi firmdecide foriris el mia oficejo, kaj celis al la universitato

biblioteko, por renkonti denove la maljunulon. La obsceda penso restis ankoraŭ en mia menso. Kial ne? Mi ja estas fraŭlo. Mia foriro farus malbonon al neniu. Alian instruiston la universitato sendube povos trovi. Kaj estus nepardoneble, perdi ĉi tiun unikatan eblon.

La veturilo estis en la sama loko. Ĉifoje la maljuna fremdulo sidis sur benko atendante min. La pordo de la veturilo estis aperta. “Bonvenon,” li diris. “Vi ja kunportis ilin? Bone.” Mi klare vidis ke estis trankvilige al li vidi siajn poterojn en miaj manoj. Li remetis ilin en sian keston, kaj poste ni denove sidiĝis sur la benkoj apud la tablo kaj parolis. Ĉifoje mi ne oscedis. Dum la tuta konversacio mia menso okupiĝis pri nur unu sola penso. Fine, kiam la maljunulo komencis iom malkvietiĝi kaj mi sciis ke la suno baldaŭ leviĝos, mi kuraĝis diri, “Ĉu eblas ke mi akompanu vin en via ekspedicio?”

Mia demando ne ŝokis la maljunulon, kontraŭe al miaj anticipoj. “Mi pensis pri tio,” li diris. “Jes, mi pensis pri tio. Estus ja bone, havi junan kolegon kiu povus helpi min en la kolektado de trovaĵoj. Kaj vi povus doni valoregajn informojn pri la tero. Mi konfesas ke la penso estas alloga. Sed.” Li paŭzis. “Mi vere ne scias kiel ni povus efektiviĝi tion. Ni tute ne planis ion tian, komprenu. Mi estas certa ke miaj sciencaj kolegoj tute ne akceptus.” Li skuis sian kapon. “Eble alian fojon,” li diris.

Mian ĉagrenon mi ne povis kaŝi. Mi jam estis konvinkinta min, dum la tago, ke nur necesos peti kaj mi akceptiĝos. La maljunulo vidis mian malfeliĉon. Mi parolos kun ili,” li diris. Eble ili aprobos. Povas esti ke ili estos pli favoremaj al la ideo ol mi supozas.” Sed mi facile komprenis ke li ne vere kredas ke tiel estos.

Mi foriris. Mi iris al mia loĝejo kaj dormis dum kelkaj horoj. Poste, mi reiris kaj inspektis la lokon kie dum la nokto kuŝis la veturilo. Nun centoj da studentoj ĉirkaŭpromenadis,

kaj tondmaŝino tondadis la herbojn. Neniu signo restis pri la veturilo. Neniu signo restis pri la tuta afero, krom la desegnaĵoj kiujn mi estis farinta pri la poteroj.

Dum la tago la studento kiu origine montris al mi la poteron revenis. "Ĉiu vi trovis kia estas tiu skribajo?" li demandis.

Jes," mi respondis. "Ĝi estas perdita el la kolekto de la muzeo. kiel mi suspektis. Ĝi estas impostkvitanco el la tria jarmilo, a.K., el Asirio." Tio kontentigis la studenton, sed mi restis tre malkontenta.

"Eble," mi pensis, "Eble. Li ja diris ke li diskutos la aferon kun siaj kolegoj. Estas malgranda eblo . . . eble."

Nun mi sidas, sola, en la Instituto. Se mi rigardas tra la fenestro de mia oficejo, mi povas vidi la kampon antaŭ la universitata biblioteko. Estas la oka horo, jam. Baldaŭ mi denove rigardos tra la fenestro.

Mi ĵus rigardis. Mia espero ne estis vana. Mi denove vidas la ŝipon sur la kampo. Mi foriros, nun.

Salutojn al vi ĉiuj.

Korespond -



Anoncoj

Anglio:

F-ino F. Baskeyfield, 150 Bankhall Rd., Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs. (Kun Usono, Kanado, Sudameriko, Aŭstralio, Nov-Zelando.)

Brazilo:

Eber Pacheco Barbosa, Box 1115, Belo Horizonte. (19 jara universitatstudento.)

Bulgario:

Vasil D. Velcev, Partizanska 16, Gabrovo. (22 jara, deziras korespondi kun gejunuloj.)

Ĉekoslovakio:

Vaclav Gadourek, Osek nal Becvon 83, Morava.

Jiri Turdik, Vlci Dul, Dohanov. (Pri filatelismo.)

Jaroslav Calek, Teplice nad Met. 4. (Pri filatelismo.)

Vera Tumova, Detrichov 113, Frydlant V.C. (Pri filatelismo.)

S-ino Mary Neznal, Govozdova Haf. 3, Praha 2. (Pri filatelismo.)

Jaroslav Zak, Strelice 338 u Brno. (Pri filatelismo.)

Fara Josef, Bezrucova 768, Milevsko II. (Pri filatelismo.)

Jaroslav Bily, Severni 1546, Praha-Sporilov. (Pri filatelismo.)

Karel Molenda, Holvekova 534/37, Ostr. Kunicky. (Pri filatelismo.)

Vanis Frantisek, Leninova 1, Jihlava. (Pri filatelismo.)

Vaclav Kasperek, Koprivnice c. 171, Okres Novy Jicin.

(Deziras bildkartojn pri N.Y.C., Philadelphia, Washington.)

Kriz Ludvik, Jihlava, Malatova 3. (Pri filatelismo.)

Hiri Novak, Palackeho 126, Benesov n/Pl. (Pri filatelismo.)

Danlando:

Esperanto - Klasoj, Ostrigsgades Skole, Copenhagen S. (30 geknaboj, 13-15 jaraj, deziras korespondi.)

Hungario:

Korpas Eva, Komjat u 37, Fuiskola, Budapest IV. (20 jara instruistino.)

S-ino Maria Haash, Budapest XIII, Grongyosi utca 47. (Kun plenaĝuloj.)

Prof. Nagy Imre, Desbrecen, Hatvan Utca 44. (Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝkartojn.)

"Haman Kato", Ottorovasut, Huvosvolg 4, Esperanto - Rondeto, Budapest II. (12-14 jaraj geknaboj deziras korespondi.)

Szabo Ferenc, Cyomori ut 128, Budapest X. (Gvidanto de la Esperanto-grupo de la Elektra-maŝino-kaj Kablo-fabriko.)

USSR:

Evald Piirimees, Riidaja, Valgaraj, Estonio. (35 jara fraŭlo, deziras korespondi, interŝangi poŝmarkojn kaj bildkartojn.)

Nikolao Danilov, Novostroja 28/17, Omsk 16.

F-ino Lea Veelma, F-ino Milvi Lilk, Fraŭlo Penno Reesaar, 14a

Lernejo, Tatari 17, Tallin, Estonio. (15 jaraj infanoj deziras korespondi kun semaguloj.)
Aloyzas Bakys, Komunaru 32, Plungé, Litovio. (14 jara.)
A. Rimkus, Parkas 2, Plungé, Litovio. (Instruisto deziras korespondantojn por siaj 12-16 jaraj gelernantoj.)



NOTES AT PRESS TIME

FLASH: Just formed is the League's Audio-Visual Department, whose chief task is the circulation of tapes and films. Of special interest: a planned "tape-of-the-month" club for local groups and individuals to receive a new tape each month for a modest yearly fee. Details from: ELNA Aŭda-Vida Fako, H. K. Ver Ploeg, Director, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Wash. Same address to borrow the color film "Jen Aŭstralio" or the Copenhagen Congress tape.

NEW PUBLICATIONS: "The Structure of Interlingua compared with Esperanto" by I. Kellerman Reed answers questions about Esperanto's current would-be competitor. 10¢ a copy (discount for quantities) from ELNA, 808 Stewart St., Meadville, Pa.... "Korespondado en Esperanto" by George Falgier, published by Instructional Aids Department, U. S. Society of Esperantist Teachers, 3622 N. Market, St. Louis 13, Mo. An excellent compilation of practical information about corresponding in Esperanto--a must for classes.

LAST-MINUTE NEWS: Former Review editor Ferd Carlson underwent major surgery in Seattle, is convalescing.... The Bureau of Elementary Education, California, included in its last quarterly report remarks by Mrs. Afton Nance, Consultant in Elementary Education, regarding Esperanto classes for children in many California schools, stating: "Future programs in this field will be studied with interest" by the Bureau.... The last-issue comment re LIFE and TIME magazines was in error. TIME printed an excellent item titled "How to be amika" July 27, 1953, wholly fair to Esperanto. Apologies to TIME Inc....

CANADIAN CONGRESS of Esperanto--ELNA members invited--will take place from June 29 through July 2 at Hamilton, Ontario. Details from Ken Price, 34 Martin Rd., Toronto 7, Ont.



Universala Esperanto-Asocio

is

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs

The *ONLY* North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?

Esperanto League for North America

c/o Jay Berry, Treasurer
3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington

Please enter a subscription to the Esperanto Review for me,
membership in the Esperanto League

to start in _____, 196 ____ I am enclosing \$2.00 for subscription
\$5.00 for membership

Name: _____

Address: _____

Esperanto Press

Oakville, Ont., Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed

